

Gradigitaj ekzercoj por la perbilda instruado
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 489, 1981.06.18 & 20

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Dum la pentekosta semajnfino okazis en La Chaux-de-Fonds seminario pri la perbilda instruado de esperanto. Al la pedagogoj kaj interesatoj pri la esperanto-instruado, kiuj partoprenis tiun ĉi aranĝon, mi disdonis serion de 44 slipoj, kiujn mi ankaŭ prezentis al vi. Ili proponas gradigitajn ekzercojn por la perbilda instruado.

A.- Sed unue ni enkonduke diru, ke bona pedagogio utiligas variajn instrurimedojn. Apud la perbilda instruado, oni ankaŭ praktiku pergestan instruadon, kaj, kiam la gelernantoj asimilis bazan vort- kaj fraz-provizon, oni komencu legi, kaj poste skribi. La perbilda instruado estu konsiderata kiel instru-avenuo, apud aliaj avenuoj kondukantaj al la sama celo: regi la lingvon.

C1.- Vi ankoraŭ sciu, ke Kultura Centro Esperantista regule organizos pedagogiajn seminariojn, por helpi la esperanto-instruantojn lertiĝi koncerne la perbildan kaj pergestan instruadon. La eklego de la ĵus menciitaj instru-slipoj donos al vi ideon pri la riĉeco de la perbilda instruado, sed antaŭ ol praktiki tiun ĉi instru-teknikon, oni devas ekzerciĝi. Tial la slipojn povos akiri nur partoprenantoj al enkondukaj instru-seminarioj. Tre verŝajne foje eldoniĝos la tuto kun la necesaj konsiloj, kaj tiam la instru-seminarioj helpos antaŭ ĉio al instru-lertiĝo.

A.- Jen la unua ekzerco proponata de la slipo unua:

C1.- Elekti dudek bildojn, kiuj inkluzivas bestojn (virojn, inojn kaj idojn), homojn, arbojn, domojn, veturilojn, ilojn kaj objektojn. Nomi la bildojn per la formulo: "Tio estas -o." Ripetigi la frazon al la gelernantoj laŭ korusa maniero. Rediri ĝin. Reripetigi ĝin korse. Ekzemplo: Instruanto: "Tio estas kato"

A.- Gelernantoj: "Tio estas kato."

Cl.- Instruanto: "Tio estas kato."

A.- Gelernantoj: "Tio estas kato."

Cl.- Oni povas meti la bildojn sur la flanel-tabulon, sur tablon, sur la plankon, depende de la situacio.

A.- Kiel vi konstatas, tiuj slipoj bone klarigas la farotajn ekzercojn. Kiam la gelernantoj intimiĝis kun la nomado de la dudek bildoj, oni povas praktiki novan ekzercon, kiun proponas la slipo dua:

Cl.- Ĉiu laŭvice aldonas bildon, ripetante la nomojn de la jam metitaj bildoj. Ekzemple: Instruanto, metante bildon de ĉevalo: "Tio estas ĉevalo."

A.- Lernanto A: "Tio estas ĉevalo", metante bildon de domo "kaj tio estas domo."

C1.- Lernanto B: "Tio estas ĉevalo, tio estas domo", metante bildon de pomarbo "kaj tio estas pomarbo."

A.- Kaj tiel plu.

Cl.- Povas aldoni bildon, nur tiu kiu kapablas rediri la tutan bildvicon. Helpi por la nomado de la nova bildo.

A.- La ekzerco ĉesas, kiam neniuj kapablas plu diri la tutan bildvicon, aŭ kiam ĉiuj bildoj troviĝas sur la tabulo.

Cl.- Oni povas refari tiun ekzercon sub formo de ludo, premiante la lernantojn, kiuj metas bildon, per ĵetonoj, kiujn poste oni lernas nombri. Venkas tiu, kiu ricevis plej multe da ĵetonoj.

A.- Kaj jen, kion proponas la tria slipo:

Cl.- Sur la flanel-tabulo troviĝas la konataj bildoj.
Instruanto: Mi prenas bildon de -o.

A.- Koruso: Vi prenis bildon de -o.

C1.- Daŭrigi tiel, ĝis kiam ĉiuj bildoj estas forigitaj.

A.- Ĉiuj komprenis, ke la formulo "Mi prenas bildon de -o" povas signifi "Mi prenas bildon de ĉevalo" aŭ "Mi prenas bildon de domo", ktp.

C1.- Vi konstatis, ke tiu ĉi tria slipo ekzercigas la distingon de la as- kaj is-tempoj kaj de la pronomoj mi kaj vi. Ni ripetas, ke en la perbilda instruado oni ne tradukas kaj oni ne krokodile klarigas gramatikajn nociojn. Ĉio akiriĝas per lingvaj ekzercoj, kiujn konkretigas la manipulado de bildoj.

A.- Jen la kvara slipo: Temas pri ludo.

Cl.- Sur la flanel-tabulo troviĝas la konataj bildoj. Laŭvice ĉiu elektas bildon dirante: "Mi prenas bildon de -o."

A.- Instruanto: Ĝuste, li (aŭ ŝi) prenis bildon de -o.

C1.- Koruso: Ĝuste, li (aŭ ŝi) prenis bildon de -o.

A.- Lernanto kiu eraras, devas lasi la bildon sur la tabulo. Jen la koncerna formulado:

Cl.- Lernanto: Mi prenas bildon de -o.

A.- Instruanto: Malĝuste, li (aŭ ŝi) prenis bildon de -o.

Cl.- Koruso: Malĝuste, li (aŭ ŝi) prenis bildon de -o.

A.- La sekvanto povas tuj preni la koncernan bildon, se li ne eraras.

Cl.- La ludo finiĝas, kiam ĉiuj bildoj estas forprenitaj. Tiam oni korse nombras la bildojn, kiujn ĉiu prenis por scii, kiu estas la venkanto.

A.- Ni donu klarigon pri nia esprimo koruso. Temas pri la ripetado fare de la tuta lernantaro de la modelaj esprimoj. En la perbilda instruado, kiel en la pergesta, la gelernantoj kutimiĝas kune ripeti la frazojn, kiujn prononcas la instruanto. Ili ĥore aŭ prefere korse parolas.

Cl.- Kaj nun jen kion proponas la slipo kvina:

A.- Havi porflaneltabulan paperon kaj skribilon.

Cl.- La instruanto sin prezentas. Ekzemple: Mi nomiĝas Klaŭdo. Li skribas sian nomon. Tuj poste li demandas: Kiel mi nomiĝas?

A.- Koruso: Klaŭdo.

C1.- Eviti la lernejecajn respondojn "Vi nomiĝas Klaŭdo", kiujn en la realeco oni neniam utiligas. La instruanto metas sian nomon sur la tabulon. Li turnas sin al lernanto dirante: "Mi nomiĝas Klaŭdo, kaj vi, kiel vi nomiĝas?" Se ne venas respondo, li provas kun alia lernanto, ĝis kiam venas respondo, ekzemple:

A.- Andrée.

Cl.- La instruanto respondas: En esperanto oni diras Andrea. Vi nomiĝas Andrea. Kiel ŝi nomiĝas?

A.- Koruso: Andrea.

Cl.- La instruanto skribas la nomon Andrea sur porflaneltabulan paperon. Li donas la nomon dirante: metu vian nomon sur la tabulon. Kiam Andrea metas sian nomon la instruanto diras: Andrea metas sian nomon sur la tabulon.

A.- Koruso: Andrea metas sian nomon sur la tabulon.

C1.- Same kun ĉiuj lernantoj.

A.- La venontan semajnon ni daŭrige prezentos tiun sliparon pri la perbilda instruado, kiu tutcerte instigos multajn instruantojn alporti pli da vivo en sian enkondukan instruadon de esperanto, tio kun la infanoj kaj ankaŭ kun la plenkreskuloj, ĉar la perbilda instruado konvenas por ĉiuj aĝoj.

Cl.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond ekprezentis sliparon pri la perbilda instruado de esperanto. Ĝis reaŭdo!